ESPERANTO SUB
LA SUDA KRUCO



Numero 16 [1995/4] — Julio-Aŭgusto 1995

Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Redaktoro: Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio. ☎ kaj faksoj: 096 46 1389. (Faksoj eblas nur post tujantaŭa averto per telefono, ĉar la telefono kaj la faksmodemo uzas komunan lineon.) Elektronika poŝto: don@enkidu.dialix.oz.au

Correspondence Courses: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park Qld 4702.

Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Jeanie Wilson GSM (G. Sutton) 3
Ekparoli–Progresraporto (Bishop) . 6
Rio, Mon Amour (T. Steele) 9
Nova libro-serio "Kargo" 11
Skribas la legantoj 14
Nekrologo: Karl Gunster 15
Lingva Angulo (A. Towsey)..... 16
Dialogoj de la Dioj (Lukiano/Martín del Pozo) 17
Diversaj..... 22
Novaj libroj ĉe la Libroservo 24
Krucvortenigmo..... 26

Libroj:

Sep Junaj Aŭstralianoj (Turner/McGrath/Payne) 12

Ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* aperas du semajnojn pli frue ol estis anoncite, pro la bezono ĝin finpretigi kaj enpoŝtigi antaŭ la komenco de la AEA-kongreso.

Se vi deziras legi pri io, verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon sur komputila disko (Macintosh aŭ MS-DOS–nur 3½-cola), per elektronika poŝto, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, bonvolu atenti: la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas. Se vi deziras resendon de disko aŭ manuskripto bonvolu kunsendi taŭgan afrankitan adresitan koverton.

Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas redakti kaj korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo, kaj konformigi ĝin al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro. La publikigo de artikolo ne indikas ke ĝi reprezentas la vidpunkton de la Aŭstralia aŭ Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

Limdato por artikoloj por la septembra numero: 19 aŭgusto.

JEANIE WILSON QSM

de

Gwenda Sutton



Noto en *Esperanto* de aprilo 1995 informis ke S-ino Jeanie Wilson estas la plej aĝa dumviva membro de UEA. Mi scias ke dum la jaroj ŝi multfoje finance subtenis UEA-n kiel membro de la Societo Zamenhof kaj kiel patrono de TEJO.

En Nov-Zelando la jaro 1993 estis signifoplena ĉar diversmaniere ni festis la centjaran jubileon de la agnoskiĝo de la voĉdonrajto de virinoj. La regiona muzeo de Wanganui decidis starigi ekspozicion pri elstaraj virinoj kiuj loĝis en Wanganui kaj la apudaj distriktoj. La parol-historia fako registris intervjuojn, kaj kolektis fotojn kaj dokumentojn pri la praavoj kiuj venis el aliaj landoj aŭ aliaj partoj de nia lando. La rezulto estis elstare interesa montraĵo kiu estis spektebla ĝis marto 1994.

La unua virino intervjuita estis Esperantistino: Jeanie Wilson. Ŝi estis naskita en Manĉestro en Anglio je la 10a de marto 1895. Ŝi venis al Nov-Zelando kiam ŝi havis naŭ jarojn. Jeanie modeste diris ke estis bonŝance por ŝi ke ŝi ricevis stipendion por studi en mezlernejo kaj poste en kolegio por instruistoj en Aŭklando. De 1929 ŝi instruis en elementa lernejo en Norda Palmerston. Kun grupo de instruistoj ŝi vizitis Eŭropon en 1935. En Germanio ŝi ne scipovis la germanan sufiĉe por rekte diskuti kun germanoj, tial ŝi sentis sin senpova kaj multe pripensis la lingvan barilon. Jeanie ankaŭ vizitis Rusion kaj Francion.

Post reveno al Nov-Zelando ŝi translogiĝis al Wanganui, kie ŝi renkontis Robert Wilson kaj edziniĝis kun li. Kompreneble, laŭ la tiama kutimo, ŝi ne plu instruis en lernejo. Dum la unua jaro de la edzineco ŝi neatendite fariĝis patrino por kelkmonata bebo kies baptopatrino ŝi estis. Ŝia propra filo estis naskita post tri jaroj. Kiam ili estis junaj, la du knaboj ofte neamike interrilatis, sed post maturiĝo ili amikiĝis kaj ili restas bonaj amikoj.

Post la morto, en 1965, de ŝia edzo, kiu estis membro de la Presbiteriana Eklezio, ŝi fariĝis membro de la Societo de Amikoj [Kvakeroj] kies celoj kaj interesoj akordas kun ŝia persona filozofio. Ŝi sentis sin ĉehejme inter ili. Jeanie estas vegetarano, kaj dum kvindek jaroj ŝi arde laboris por paco, por plibonigi kondiĉojn por homoj, infanoj, virinoj, maljunuloj, kaj ankaŭ bestoj.

Jeanie estis tre agadema virino. Kiam ŝi vidis bezonon, ŝi elpensis metodon plenumi la bezonon. Jeanie multe parolis kun aliaj nelaborantaj virinoj. Dum la 50'oj ŝi fondis grupon por edukado de plenkreskuloj, ĉar ŝi

opiniis ke patrinoj kun junaj infanoj devus plivastigi siajn kapablojn. La grupo diskutis modernan arton kaj psikologion. Post kiam la grupo ligiĝis al Massey Universitato de Norda Palmerston, prelegantoj dungitaj de la Universitato vizitis Wanganuin por eduki ilin diversteme. En la sama periodo, Jeanie Wilson estis aktivulo kiu helpis starigi filion de UNICEF en Wanganui, kaj dum multaj jaroj ŝi estis ĉefrolanto en la vendado de kristnaskaj kartoj de UNICEF.

En la 60'oj ŝi fondis grupon en Wanganui, por ke aliaj studu Esperanton, ĉar ŝi opiniis sin tro maljuna por akiri novan lingvon.

S-ro Wilson mortis en 1965 kaj en 1967 Jeanie decidis lerni Esperanton. Ŝi jam studis la francan kaj latinan lingvojn, do post ses semajnoj da studado ŝi denove vojaĝis eksterlande sed ĉifoje kun Esperanto. Ŝi partoprenis la Universalan Kongreson en Roterdamo kie ŝi aŭdis multajn bonajn parolantojn. Ŝi menciis ke viro kies nomon ŝi forgesis estis elstara. Mi sugestis ke eble la oratoro estis D-ro Ivo Lapenna. Kiam S-ino Wilson jam ne plu estis juna, ŝi diris al sia filo—kiu tiutempe vagis tra Eŭropo, kaj troviĝis en Roterdamo —ke ŝi ne povos atingi ceremonion ĝustatempe. Li proponis veturigi ŝin motorcikle al la halo. Do, vestita en longa robo, ŝi motorcikle atingis la kongresejon. Post la Universala Kongreo, dum ses monatoj ŝi vojaĝis tra Aŭstrio, Francio, Germanio, Jugoslavio, Nederlando, Sovetunio, Svisio kaj Japanio kaj ĉie ŝi parolis Esperante pri Nov-Zelando. Kiam ŝi revenis al Nov-Zelando ŝi kapablis tre flue paroli Esperanton.

Ŝi estis tre aktiva membro de NZEA dum pli ol tridek jaroj, havis multajn korespondantojn, kaj restis delegito de UEA ĝis ŝi havis naŭdek sep jarojn. Ŝi kaptis ĉiun oportunon proponi la uzadon de Esperanto internacie.

En 1980, kiam S-ino Wilson estis okdekkvarjaraĝa, ŝi per vendado de kristnaskaj kartoj gajnis $4 700 por UNICEF. La ĉiujaraj vizitoj al lernejoj por grandigi la vendadon de la kartoj certe daŭris ĝis 1987, sed eble pli longe.

En 1983, kiam ŝi ricevis la *Community Service Award*, ŝi estis prezidanto de YWCA, membro de la Asocio por UN, membro de Panpacifika Oranizo de Virinoj, membro de la Muzika Societo de Wanganui, membro de Paca Forumo de Wanganui, kaj membro de organizo celanta malanalfabetigi plenkreskulojn. Dum pli ol dudek jaroj Jeanie elspezis multe da tempo ludante pianon por dek grupoj de maljunuloj. En 1987, do naŭdekdujaraĝa, ŝi ankoraŭ estis membro de tiuj grupoj.

En intervjuo en 1987 ŝi diris ke ŝi ne sentas sin maljuna, do kial sidi hejme en lulseĝo trikante? Ŝi diris: "Multaj homoj ne kredas ke mi estas naŭdekdujaraĝa, ĉar mi povas promeni, mi estas feliĉa, kaj mi ĝuas la vivon."

La vizito al Velingtono en 1988 por

ricevi de Kavaliro Paul Reeves, reprezentanto de Reĝino Elizabeto, la QSM-medalon, estis tre ĝojiga evento.

En novembro 1993, kiam mi lastafoje vizitis ŝin, mi trovis ŝin lerte ludanta la pianon en la hejmo por maljunuloj kie ŝi nun loĝas. Ŝi estas preskaŭ blinda do ne plu legas, sed ŝi ankoraŭ vigle parolas.

En intervjuoj ŝi ĉiam diris ke ŝi estas bonfortuna ĉar ŝi havas bonan sanon. Dum intervjuo kiun mi aŭskultis ŝi diris: "Ĉar mi estas skotdevena, mi malŝparas nenion. Mi utiligas ĉion kion mi havas." Kompreneble ŝi esprimis bedaŭron ke ne plu estas Esperanto-grupo en Wanganui. Eble menciinde estas ke Jeanie instruis kaj Esperanton kaj muzikon al David Rockell, la nuna prezidanto de NZEA.

Dum la lastaj jaroj ŝi ankoraŭ skribis leterojn al la Ĉefministro, la Ministro pri Defendo, kaj al ĵurnaloj, pri nuklea malarmado, aĉetado de fregatoj, referendumo pri ŝanĝoj de la sistemo de voĉdonado, kultura identeco, reklamadoj de Telecom, rilatoj inter Nov-Zelando kaj Orienta Timoro, kaj la valoro de Esperanto kiel mondlingvo.

Mi bone memoras ŝian elokventecon kaj sincerecon kiam ŝi partoprenis la oratoran konkurson de NZEA en 1975. Kvankam nova stelo en la Esperanta mondo, Stefan MacGill, gajnis la trofeon, ŝia deklamo estis kiu emociigis min. Aŭskultado de la intervjuoj donis plezuron al mi, ĉar mi akiris informon, sentis ke ŝi parolas al mi, kaj ĝuis ŝiajn klaran prononcadon, pensemajn deklarojn, edukitan frazfaradon kaj agrablan voĉon. Mia plej viva memoro pri Jeanie devas esti kiam ŝi, jam pli ol okdekjaraĝa, rolis kiel maljuna virino en teatraĵo. Tiucele ŝi surmetis ŝalon, trovis apogbastonon, kurbigis sian dorson kaj komencis paŝi malrapide.

Jeanie Wilson dediĉis sian vivon al la helpado de aliaj kaj trovis feliĉon.

I am indebted to Michelle Horwood; to Karen Kitson, who interviewed Jeanie Wilson as part of the Women's Suffrage Project 1993; the director of the Wanganui Regional Museum, who consented to send the tapes to the Oral History Archive at the Alexander Turnbull Library section of the National Library of New Zealand, enabling me to hear the tapes and read the accompanying abstracts; and to Bryan Deighton, Information Services Librarian, Wanganui Library, who sent photocopies of three articles written about Mrs Wilson. ❑



desegnis Igorj Sitnikov

EKPAROLI— PROGRESRAPORTO

de Jennifer & Alan Bishop

La projekto EKPAROLI, ĉe Monash Universitato celas esplori ĉu la lernado de Esperanto en elementa lernejo helpos la lerniĝon de aziaj lingvoj (japana, ĉina, vjetnama lingvoj) en gimnazio. Dank' al la grandanima financsubtenado donita de Melburna Esperanto-Asocio $5000, Esperanto-Federacio de Victoria $1000, Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio $1000, Federacio de Sudaŭstralio $1000, Esperanto-Federacio de Novsudkimrio kaj AEA $5000, Monash Universitato $3,882, Christopher Dean, Terri Metherall, Gerald kaj Ruth Tumman, la projekto komenciĝis je la fino de oktobro 1994.

Du tre bone kvalifikitaj junaj helpantinoj estis dungitaj dum kvar monatoj: Judy Williams, sperta instruistino de elementa lernejo, kaj Renata Summo-O'Connell, instruistino de la itala lingvo kaj esplorstudentino pri lingvistiko. Jennifer Bishop helpis pri tradukado en Esperanton.

Je la komenco estis kontaktitaj 98 elementaj lernejoj por informiĝi ĉu la lernejo jam havas LOTE- (Language Other Than English) -programon, ĉu oni informis ilin pri Esperanto kaj sendis informilojn pri EKPAROLI, proponante *Mazi en Gondolando* kiel lernokurson. Antaŭ la fino de la lerneja jaro, tri lernejoj konsentis partopreni la esplorprojekton en 1995: Clayton North Primary School, Edithvale PS kaj Carrum PS; tamen ne ekzistis en Victoria Esperanton-parolantaj instruistoj por elementa lernejo.

Sekve, naŭ instruistoj de la tri lernejoj konsentis lerni la lingvon antaŭ ol kaj dum ili instruas ĝin. Kompreneble tio ne estis ideala situacio kaj ne dezirata laŭ la leĝo de la Direktoraro pri Edukado de Victoria, sed al tiuj lernejoj ne restis alternativo. Dufoje Alan Bishop vizitis Edithvale Primary School, unue por alparoli ĉiujn interesitajn instruistojn de la tri lernejoj, kaj due por alparoli la gepatrojn ĉe Edithvale Primary School, kiuj post klarigo, senhezite subtenis la projekton kaj eĉ deziris mem lerni. La nova senpaga korespondkurso estis havebla kaj aliaj eblecoj estis proponitaj.

Ĉar ekzistis nur provparto de *Mazi en Gondolando*, Renata, Judy kaj Jennifer verkis komplementan kurson, petinte de BBC permeson utiligi desegnaĵojn el la angla versio. Permeson BBC volonte donis, kondiĉe ke ni sendu ekzempleron de la materialo kaj ke BBC havu la kopirajton. Dank' al Greg Robinson, teknikisto de la Eduka Fakultado kaj spertulo pri la ĝisdataj Macintosh-komputiloj, la instrumaterialo aspektas tre aloga kaj ofertas al la infanoj multajn eblecojn por plibeligi per koloroj la bildojn.

Dum la lasta semajno de la somerferioj estis farita Esperanto-kurso por 4 el niaj 9 instruistoj, uzante la novan Mazi-materialon. Malgraŭ sia antaŭtimo, la instruistoj multe ĝuis la kurson, multon lernis, kaj trankviliĝis pri sia kapablo instrui siajn gelernantojn daŭrigante samtempe sian propran studon de Esperanto. Post la komenco de la lerneja jaro, ni komencis dumservan kurson por ĉiuj naŭ instruistoj, kiu daŭris ok

semajnojn.

Ĉiuj 9 instruistoj nun instruas Esperanton dum 2¼ horoj semajne, laŭ postulo de la registaro de Victoria, sed pro manko de tempo, ili integrigas la instruadon de Esperanto kiel eble plej multe en la instruadon de aliaj stud-fakoj, ekz. muziko, sporto, angla lingvo, matematiko, geografio, historio ktp.

Jam estas preparita dua kompleto de instrumaterialo, kiu ne temas pri *Mazi* sed pri la ĉiutaga vivo de infano, por faciligi interkomunikadon kaj komprenadon pri lingvoj kaj rasoj tra la mondo, same kiel komprenadon pri la propra familio kaj ĝia deveno. La intenco estis ke la du kompletoj provizu sufiĉan instrumaterialon por unu jaro se malfeliĉe la tuta kompleto de *Mazi en Gondolando* ne aperus.

La Sorto benas Esperantion! *Mazi en Gondolando* ja aperos en 1995 kaj jam estas mendita kompleto por ĉiu lernejo.

La enkonduko de Esperanto en la lernejojn jam vekis atenton. Aperis artikolo pri ties elektiĝo kiel LOTE kun tipa komento de lingvisto de Melbourne Universitato pri la manko de kulturo. La lernejestro de Clayton North Primary School kiu en sia lernejo prizorgas infanojn el pli ol 30 diversaj kulturoj bone kaj efike defendis sian elekton de Esperanto; kaj Alan konsterniĝis ke klerulo ŝajne ne opiniis valora veran serĉesploradon pri ĝia efikeco rilate al lingvolernado. Titoloj en loka ĵurnalo dum tri semajnoj estis "Language of Peace gains a new lease of life", "Esperanto of no use", "Sad to see negativity: professor". Dum tiu ĉi periodo okazis la Clayton-Festo kie la Federacio de Esperanto jam antaŭlonge decidis establi budon kaj en ĝi deĵori. Tri kuraĝaj Esperantistoj serĉis sian lokon kaj tuj rimarkis la infanojn de Clayton North Primary School starantaj kaj tenantaj flagojn kaj ŝildojn de ĉiuj iliaj nacioj. Jen la ĝusta loko por Esperanto, malantaŭ la budo de Unuiĝintaj Nacioj. Kia ĝojo kiam knabo tuj turnis sin kaj rigardante nian standardon "Esperanto mondlingvo" ekkriis "Saluton, mi estas Steven, kiu estas vi?"

Nun komenciĝas dua parto de la esplorprojekto. Monash Universitato kontribuas $30 000 kaj estas nun dungitaj tri helpantinoj; Judy Williams, Jennifer Bishop kaj Paddy Zakaria, jama esplorstudento pri lernado de dua lingvo kaj spertulo pri statistiko. La dua parto de la projekto koncernas la nombradon de infanoj, kontroladon de eventualaj gimnazioj, kontroladon de aliaj elementaj lernejoj kies infanoj iros al la samaj gimnaziaj lernejoj, informkolektadon pri ties LOTE kaj ankaŭ informkolektadon pri la instruistoj de la diversaj LOTE-programoj. Poste oni sekvos la infanojn dum ili lernas aŭ azian aŭ eŭropan lingvon dum, eble, tri jaroj.

La rezulto nuntempe estas nekalkulebla kaj eĉ se ĝi montros ke Esperanto ne helpas pri la lernado de azia lingvo aŭ ke ĝi helpas same kiel alia LOTE oni jam scias ke miloj da homoj en Aŭstralio lernos pri Esperanto kaj ĝia efikeblecoj por internacia komunikado. →



Antaŭa vico: maldekstre, Max Wearing; dekstre, Jennifer Bishop
Malantaŭa vico: dekstre, Kep Enderby
Aliaj: ok instruistoj de Esperanto en elementaj lernejoj en Viktorio.



Infanoj en elementa lernejo kantas Esperante. (Projekto EKPAROLI) ❑

RIO, MON AMOUR

rakonto de Trevor Steele
(el Brazilo)

Hodiaŭ matene mi devis refoje veturi en la urbocentron. Doktoro Pereira insistis. Kial la sola kuracisto, kiu kompetentas pri mia malsano, devas loĝi tie?

Kompreneble mi preferus iri taksie, sed vi scias, kiom tio kostas. Miaj konatoj, kiuj *ne* estis prirabitaj dum busveturo, estis esceptuloj, kaj mi bone memoras la dikajn lipojn kaj putrantajn dentojn de la danĝera knabego, al kiu mi devis transdoni mian monujon.

Rezignacie kaj timete do mi ŝlosis per la tri seruroj de mia apartamenta pordo kaj lamis ĝis la bushaltejo. Malgraŭ ĉio mi iom ĝuis la panoraman rigardon de nia monteto sur la urbon; ju pli alte oni staras, des pli bone aspektas nia urbego.

Bonŝance staris jam deko da homoj, plejparte junuloj, ĉe la haltejo. Mi scias ĝustatempe formi barikadon sur la aŭtovojo por devigi la busŝoforon haltigi. Ofte la ŝoforoj ignoras vin, se vi restas sur la trotuaro. Onidire ili timas, ke senmova buso estas facila predo por rabistoj.

Nu, miaj agresemaj kunpasaĝeroj sukcesis, kaj ni enbusiĝis. Restis eĉ iuj sidlokoj. La ŝoforo, kiel ĉiuj sinjoroj kolegoj, imagis sin partoprenanto en konkurso de La Mans. Ruĝaj semaforoj kaj bushaltejoj (kie klientoj ne baris la aŭtovojon) estis ignorendaj. Konfesende, la desupra vojo stimulis liajn konkursĉampionajn ambiciojn. Mi volis fermi la okulojn ĉe ĉiu vojkruciĝo, ĉar ja venis de maldekstre kaj dekstre konkursrivaloj, sed ili cedis al niaj superaj dimensioj; mia koratako do ne plenumiĝis.

Iam ni devis veturi supren, kio ĝenis la atingojn de nia Le-Mans-ulo, kaj ĉe la posta haltejo staris dekoj da informitoj sur la asfalto. Rapide la embuskintoj plenigis la buson. Ĉiu sidloko estis okupita kaj la malrapidmovaj virinoj devis stari.

Mi rekonis la maljunulinon, kiu sidiĝis kontraŭ mi. Dum la jaroj mi vidis ŝin dekojn da fojoj, kaj kvankam mi neniam interŝanĝis eĉ unu vorton kun ŝi, iuj elementoj el ŝia biografio iel atingis min. Mi scias, ke ŝia nomo estas *dona* Julia. Laŭdire tre bela en siaj fruaj jardekoj, sed kiel jugi tion ĉe okdekjarulino? Iama aktorino, edziniĝis al riĉa oldulo, kiu forlasis ŝin post la naskiĝo de ilia dua kripluleto. Mi ne garantias la pravecon de tiuj onidiroj, sed mi ne havas kialojn por pridubi ilin.

Dona Julia portis purajn sed evidente malnovajn vestojn. Kio restis el ŝia riĉuledzina vivo? Aha, almenaŭ unu aferon: ŝia mansako preskaŭ glitis planken, kaj dum ŝi manovris por rekapti ĝin, mi ekvidis evidente multekostan edzinan ringon sur la maldekstra mano. Kun surpriza rapideco ŝi kovris tiun manon per la sako kaj metis la dekstran manon firme sur la sakon. Ŝia rigardo trafis mian; ŝia nervozeco malaperis, ĉar

ŝi evidente juĝis min, sepdekjaran malsanulon, nebandito. Mi permesis al mi bonhumore riproĉi ŝin perokule: Sinjorino, estas malprudente porti juvelon publike.

Ke mia riproĉo estos tiel rapide pravigita, mi ne tuj komprenis. Malaltstatura sed ŝvelmuskola junulo subite alproksimiĝis kaj flustris ion al ŝi. Ŝi tute ne reagis. Li flustris pli laŭte. Ŝiaj maljunaj okuloj rigardis apatie rekte antaŭen. Kolere la junulo klinis sin tuj apud ŝian orelon kaj siblis tiel forte, ke ankaŭ mi aŭdis: "Donu-al-mi vian ringon!!"

Li sentigis tranĉilpinton ĉe ŝian nukon. Fine *dona* Julia decidis agnoski lia ekziston. Ŝi metis manon ĉe la orelo kaj demandis laŭte: "Hej? Hej? Ĉu vi diris ion?"

"Fermu la faŭkon, vi maljunulinaĉo, kaj donu al mi vian ringon!!"

"Ej? La horon? A...bedaŭrinde mi ne havas horloĝon," ŝi grakis.

"Ne ludaĉu kun mi, vi putranta ostosako—donu la ringon!"

"A...a...mi komprenas! Vi volas monon por cigaredoj. Bonvolu, ankaŭ mi iam fumis." Ŝiaj vortoj estis sufiĉe laŭtaj por atingi ĉiujn najbarojn. "Sed mi malkonsilas kontraŭ fumado."

La nervoza juna bandito premis iom la klingopinton: "Ĉu vi volas ke mi trapiku vin, vi bovinaĉo?"

Doloro devigis ŝin ekmovi la nukon. "Sinjoro," ŝia voĉo estis kortuŝeforpuŝe maljuna, "Mi jam konsentis financi vian fumadon. Bonvolu forigi vian tranĉilon, dum mi serĉos monon."

Ŝi ekmanovris per la dekstra mano en la mansako. La ŝvitanta huligano kontraŭvole forprenis la tranĉilon de ŝia nuko, kaj malpacience rigardis ŝiajn plumpajn movojn.

Subite la buso estis plena je orelŝira virina kriego: "Atako! Atako! Atako!"

Eĉ la konkursĉampiono aŭdis tion. Tuj estis akra radskrapa bremsiĝo, kaj la pordoj ĵetmalfermiĝis.

La panikiĝinta junulo eksaltis el la buso kaj malaperis ie trans la trotuaro.

Dum la graveda silento alpaŝis nin alia pasaĝero, tre imponaspekta grandstaturulo, "Kia estas la problemo? Kio estas?" Lia basa voĉo sonoris je aŭtoritato.

Fine mi sukcesis raŭki: "Sinjoro policisto, tiu juna bandito minacis la kompatindan sinjorinon kaj postulis ŝian ringon."

Min surprizis, ke *dona* Julia ĵetas al mi forte riproĉan rigardon. Finfine mi volis nur helpi ŝin.

"Dankon, sinjoro. Nun mi komprenas. Diru, sinjorino, ĉu vi donis ĝin al li?"

Mi volis certigi la policiston, ke la bandito fuĝis kun malplenaj manoj dank' al la kuraĝo kaj ruzeco de *dona* Julia. Sed laŭtega ploreksplodo el ŝia brusto ŝiris la aeron: "Je-e-es, s'joro ...tiu aĉ...aĉulo prenis la...la lastan mem...memorigilon pri...pri mia... mia karmemora edzo." Dume ŝi firme tenis la mansakon sur la maldekstra mano.

"Hm," sonoris la basvoĉo, "eble mi povos kapti tiun aĉulon," Kaj ankaŭ

li saltis el la buso kaj malaperis.

"Mi rekonis lin," kriis iu virino, "tiu viro estas Granda Gregorio! Li estas tre danĝera bandito!"

Mi lasis la kapon fali kaj ruĝiĝis. La teatra plorado de *dona* Julia cedis al mieno, kiu perfidis ioman kontentiĝon. Sed ŝia ringo restis kaŝita.

[Por May Bĳleveld] ❑



NOVA LIBRO-SERIO KARGO

raportas István Ertl

En la pasinta jaro aperis la fajne manfarita libro *Vivi sur barko* de Eugène de Zilah. Ĝia eldonisto, Jean-Claude Bernard, lanĉis tiun volumon—veran unikaĵon en Esperantio—kiel unuan eron de la beletra serio **Kargo**.

La nomo de Jean-Claude Bernard sonas prestiĝe por libroŝatantoj en Francio, kiujn li regalas per verkoj presitaj arte, laŭ la Gutenbergaj tradicioj de sia metio (plumba kompostado permana, sur papero pure el ĉifono). Bernard estas homo nova en Esperantio, sed jam entuziasma pri ties kulturaj potencialoj.

Tial li ŝatus kiel eble plej frue aperigi ankaŭ jenajn **Kargo**-volumojn:

• *Lando malekzista* (poemaro de la jam legenda finn-sveda aŭtoro Edith Södergran, tr. Sabira Ståhlberg; ĉ. 25 nederlandaj guldenoj);

•*Havenoj* (la dua originala volumo de Mauro Nervi; ĉ. 30 gld.);

•*Kaoso en Budapeŝto* (memoraĵoj pri "la esperantista Schindler", pri kiu vi povas legi en la maja numero de la UEA-gazeto *Esperanto*; ĉ. 40 gld.);

•Kaj dekon da aliaj manuskriptoj, kiuj atendas en tirkesto: originalaĵojn de Manuel de Seabra, Gafur Gazizi, Higinio García, tradukojn el Villon, Pessoa, Sándor Szatmári, ktp ktp.

Tamen, estante malgranda eldonisto, Jean-Claude Bernard per siaj propraj rimedoj ne povus eldoni pli ol po unu volumon en 1-2 jaroj. Tial, *por doni elanon al la Esperanta literaturo*, li alvokas vin subteni la agadon de **Kargo** kaj samtempe profiti mem kiel ĝia kliento.

Fariĝu abon-apoganto de **Kargo**

•sendante minimume 50 nederlandajn guldenojn al la UEA-konto "karg-x". (Vi povas sendi pere de la Libroservo de AEA.)

Vi ricevos tuj post apero, kun 25%a rabato:

•*Lando malekzista* de Edith Södergran (18.75 gld. anstataŭ 25 gld, kaj sen kromaj poŝtkostoj) kaj/aŭ

•*Havenoj* de Mauro Nervi (same kun 25%a rabato).

Per la restanta sumo vi povos aĉeti *Kaoso en Budapeŝto* aŭ/kaj sekvajn **Kargo**-volumojn, daŭre kun 25%a rabato. (Bv. klare indiki viajn preferojn.) Post elĉerpiĝo de via mono, vi povos renovigi vian statuson de abonanto-apoganto per denova sendo de 50 gld.

•Se vi sendas almenaŭ 75 gld, vi povas mendi ankaŭ la jam aperintan *Vivi sur barko* (37.15 gld.) ❑

SEP JUNAJ AŬSTRALIANOJ

recenzas Vera Payne

Sep Junaj Aŭstralianoj de Ethel Turner. Traduko de la angla romano *Seven Little Australians*. Tradukis Ruth McGrath. Bookleaf Publishing, Aŭstralio, 1994. 78xA4 paĝoj.

Privata eldono, ne vendata sur la libromerkato. Ĉiujn komunikaĵojn pri la verko bonvolu sendi al la tradukinto: S-ino Ruth McGrath, 41 Reynolds St, Mt Pleasant WA 6153.

Sep Junaj Aŭstralianoj (*7JA*) unuafoje eldoniĝis en septembro 1894, do ĝi preskaŭ samaĝas kiel Esperanto. Per la romano 24-jaraĝa Ethel Turner kaptis la koron de milionoj da legantoj en almenaŭ 10 lingvoj —nun, dank' al Ruth McGrath, almenaŭ 11. Aldonu la koron de pliaj centmiloj da teatro- filmo- kaj televido-spektantoj. Verŝajne neniu alia aŭstralia libro por infanoj estis tiom amata tiom longe de tiom da legantoj ĉiuaĝaj. Antaŭ ĝia apero, la plimulto da "aŭstraliaj" infanlibroj estis verkitaj, ilustritaj, kaj eldonitaj en Anglio por la Angloj. Ili liveris al la Angloj ĝuste tion kion la angla legantaro atendis. Sed ili ne veris.

7JA ŝanĝis ĉion. La aŭtorino, kvankam angle naskita, plenkreskis en Aŭstralio. Ŝi kontentiĝis verki pri ĉiutagaj urbohejmaj aventuroj—kun kamparaj ferietoj—ne malsimile ol Louisa May Alcott kiu en Usono verkis per simila stilo alian klasikaĵon *Little Women* (*Virinetoj*). Tiele naskiĝis la unua vere aŭstralia porinfana literatura klasikaĵo. La verko kuraĝigis la pluan evoluon de literaturo por aŭstraliaj infanoj.

Sed ne mispensu ke ĝi estas libro nur por infanoj. Ni ĉiuj estis knab' aŭ knabino. Pro tio, la libro ne povas ne ĉarmi. Kiu el ni ne memoras la intensan plezuron kiun donis al ni la mitoj, legendoj, ferakontoj, knabaj-knabinaj "trezoraroj"? La aventuroj de princinoj kaj kavaliroj, kaj de pilgrimoj kaj sanktuloj? La lukto inter bono kaj malbono? Sen prediki ili instruis al ni multajn el la grandiozaj universalaj lecionoj kiujn la universitato de la vivo poste ratifis. Ilin ni plejparte forlasis en la estinteco. Sed fojfoje renaskiĝas la amataj rakontoj el la pasinteco, aŭ pere de nova libro-eldono aŭ de filmo. Nun Ruth faris bele simplan tradukon de meritoplena aŭstralia verko kiu bildigas al ni fantazion tute kredeblan.

Ethel Turner evidente amis infanojn. Eĉ pli mirinde, la "hontinda tribo" da infanoj en la rakonto amas unu la alian! La romano elvokas econ de alia mondo. Unuavide jen idilio. Bonkora vicpatrino surportas robon el flava silko, aŭ blanka muslino kun ĉerizkoloraj rubandoj...Sed ŝia tre bela tualet-robo vidigas pinglojn anstataŭ butonoj, kaj ankaŭ disŝiritan punton. Ĉu atesto de ĉarma leĝero aŭ de nura pigreco? Nu, ŝi estas nur 20-jaraĝa, kaj krom prizorgi ses vicinfanojn ŝi jam naskis unu propran.

Ĉiu el la roluloj apartenas al iu fora, nostalgiiga tempo. Di' en sia ĉielo, ĉio bonas en la mond'. Ĉu ĝi estis pli bona mondo? Certe pli malrapida, kaj iel pli hom-eca. Sed ankaŭ troviĝas pli malhela flanko. La konstante fumantan patron, tiraneman, mi trovis ege antipatia, sed tute ne

dubas ke li tipigas la soldato-patron tiutempan. Lia traktado de sia fileto, Bunty, estas nesenkulpigebla. Nesentema tiranulo. Mi ne kulpigu lin pro la sep infanoj, kaj 20-jara edzino. Estis tia epoko. Vi facile divenos kial la unua edzino mortis. (Parenteze, du indoneziaj amikinoj informis min, ke iliaj patrinoj ambaŭ naskis po 21 beboj. Peston al testosterono.) Malestiminda estas la malĝentileco de la infanoj al la servistino. Politike ĝusta la romano ne estas. Pripensu: "Shut up for a Dutch idiot!" Al knabo oni donacis "the jolliest little stunner of a gun". Aliflanke la geknaboj estas relative simplanimaj, amemaj, nepostulemaj, male al la aŭstraliaj kaj aliaj unua-mondaj infanoj nuntempaj kiuj ĝenerale estas tro dorlotitaj bubaĉoj kun altege kostaj vestoj kaj ŝuoj, kaj materialaj posedaĵoj tro multaj. Aliflanke la hodiaŭaj infanoj ankaŭ estas pli profundaj ol ili supraĵe aspektas, kaj ilin ĉagrenas la problemoj de la propra lando kaj de la mondo.

Plejparte la homoj en *7JA* estas amoplenaj. La rakonto al mi neniam tedis. La "heroino" Judi, pasioplena ribelantino, naskiĝis cent jarojn tro frue! (Ĝuste kiel Jo, la plej pensoprofunda *Virineto*.) La senkulpeco de la pli aĝa Meg kortuŝas. Por ni urbanoj estas aparte instrue legi kiel estis, kaj eble ankoraŭ estas, en la forforaj bienegoj koncerne provianton. La kruelecon de brutbredado ni plejparte elektas ne pripensi. Nur vegetaranoj ne hontu. Tamen, tia estas la mondo, dent'-kaj-ungeca.

La traduko estis por Ruth sendube amlaboro. Kaj ne facila tasko. Provu mem per: conny (ludglobeta); brought the girl to a perilous pass; Sydney's Colney Hatch gingerbread nuts; cribbed, cabined and confined space; flounced from the room; her Ulster. Miaopinie ŝi bonege sukcesis kapti la guston de la originalo, sen tro komplikaj vorttordaĵoj. Odlo vizitis (ne tre ofte) kaj pri unu-du esprimoj la Ĉinoj nepre gratus la kapon. Ellasita estas aborigena mito, kiu post manko en pluraj anglaj eldonoj, retroviĝas en la nova "Centennial", kiu eldono cetere belegas pro altkvalita papero, eleganta presliteraro, malmola kovrilo kaj plenkoloraj, tutpaĝaj, tre allogaj bildoj. Ho ve. Tamen! Aĉetu la Esperanto-version[1]. Ankaŭ tre kontentiga. La formato estas laŭ *La Respubliko*. Mi trovis ĝin iom plumpa por enlit-legado, sed kun literograndeco tre plaĉa. Jen interesa rakonto, gratulinda traduko, ĉio ege diskutinda. Fruaŭstralia gemo. ❑

[1] Domaĝe, ankoraŭ neniu Esperanta eldono aĉeteblas. Ĉi tiu eldono estis privata limigita (20 ekzempleroj) eldono.

Deziras Korespondi

JEAN CUENCA, 16 Rue des Garnaudes, 63400 Chamalières, Francio. 31jara, senlabora elektroteknikisto kun 3jara fileto. *Karate*-praktikanto. Trotski-komunisto. Deziras korepondi kun aŭstralazianoj.

NOVA MONDANO

Naskiĝis la 7an de aprilo, 1995, KARA LOUISE, 8lbs, 8oz. Esperanto-filino de Lian kaj de Steve Pitney, informadisto de Melburna Esperanto-Societo.

SKRIBAS LA LEGANTOJ

De Alberta Casey:

Mi abonas al *La Suda Kruco* kaj legis senplezure vian recenzon pri mia voĉo. *[**ESK** 13, Januaro 1995 p.14.]* Vi povas imagi aŭ eble ne!

This letter will be written in English although I could write to you in Esperanto.

I think that maybe you'd like to know more about the person whose music and voice, you so criticized.

In fact, S-ro Broadribb, I am hoping to attend the international congress in Australia and at that time meet the man who attacked my sincere contribution to Esperanto.

First of all I am amused that you even mentioned Edith Piaf.[1] She is a French legend, very popular but she is known for her interpretations certainly not her voice. You've got to be kidding! I am certainly not Edith Piaf, I am Alberta Casey.

When I made my two recordings my first priority was the pronunciation. Financially I paid for everything myself, the label, the musicians, I designed the cover in color, an added expense. It was a labor of love for Esperanto because I believed in the cause.

I paid my own way travelling around Europe visiting clubs and singing for various groups, even at the international congresses. I made many friends and seemed appreciated.

No longer can I travel, teach or promote Esperanto as I used to. Because I had a number of cassettes left over, I decided to send them at my own expense to Esperantists all over the world. The postage alone cost me plenty. I have received some very nice letters of appreciation.

The songs I chose I loved. I had to write for permission to use them with an Esperanto text and I had to pay for the use, of each one!!

I am also an artist—oil painting but I don't think I want you as my critic. Looking forward to meeting you some day, Sincerely,

Alberta Casey

PO Box 626
La Jolla Ca 92035
USA

De Martin Purdy:

SUPERREALISMA POEMO TROVITA

Post longaj esploroj pri la vivoverko de poeto de la pola superrealisma skolo, Tadeusz Jaberwocki (m. 1954), mi ricevis antaŭnelonge inter miaj korespondaĵoj maldikan, rande bruniĝintan folion, kiu entenis la sekvantan versaĵon:

Estis brilege, kaj la silikaj tofoj
Ĝiris kaj gamelanis en la faboj.
Mimoze estis, bori gruon
Kaj la momiaj ratoj eltombiĝis.

Laŭ la stilo, ŝajnas, ke la versaĵo apartenas al la meza periodo de la poeto (1930-1940). Li estas relative nekonata de nia generacio, kaj estas grava tasko, pli bone diskonigi kaj

[1] Edith Piaf (1915-1963) franca kantistino. I.a. ŝi famigis la kanton "La vie en rose" kiu (tradukite) estas la unua kanto sur unu el la kasedoj de Alberta Casey.

Esperanto dream comes true



Years of letter writing and lobbying have finally paid off for Idyss Einihovici. Her campaign to teach children Esperanto is to get a trial in a state school.

A dream came true for a 91-year-old Floreat woman last week.

Idyss Einihovici learnt the Ministry of Education had agreed to find a WA primary school to participate in a one-year trial teaching Esperanto.

Idyss must provide funding, including payment of an Esperanto teacher.

The ministry says it is not able to make any commitment to teaching Esperanto after the trial.

Idyss, who says she only lives to teach the international language to the children of Australia, believes this will be the beginning of breaking down world barriers.

She had been writing to the government and other organisations for years to have the language introduced into schools. She felt she was finally winning her battle.

"The Esperanto Association has $17,000 in its funds," said Idyss.

"The money is just sitting there waiting for an opportunity like this.

"I will put more money towards the trial if it is needed. The teacher we hope to get will not have to pay for a house because I have a duplex that he can live in."

Idyss, who was born in Poland, speaks nine languages. She learnt Esperanto about 30 years ago when she came to Australia with her husband Dr Tim Einihovici.

Idyss Einihovici, of Floreat (W.A.)



MINISTER FOR
EDUCATION

Mrs Idyss Einihovici
88 Newry Place
FLOREAT PARK WA 6014

Dear Mrs Einihovici

Your proposal to have Esperanto taught in Western Australian schools was referred to the Education Department of Western Australia for consideration.

The Education Department has advised that they are prepared to trial Esperanto on a one year basis by advertising for a primary school willing to participate in a trial.

In accordance with your kind offer, the funding for the teacher would be through your trust fund. However, you should be aware that the Central Office of the Education Department will not provide any additional financial support and also will not make any commitment to support the teaching of Esperanto after the initial trial year.

Should you wish to proceed with this proposal, could you please contact Mrs Dianne Kerr (PH: 264 5600) at the Education Department of Western Australia.

Yours sincerely

Alby Huts

ALBY HUTS
SENIOR POLICY CONSULTANT

4.AH/NLT

cc Dianne Kerr
Executive Director
Education Services

27 APR 1995

10th Floor, London House 216 St George's Terrace Perth WA 6000
Telephone 321 1441 Facsimile 321 1445

Esperanto to be taught in a W.A. primary school

SCOUTS TOO WANT ESPERANTO



ESPERANTO STAND AT THE ASIAN-AUSTRALASIAN JAMBOREE, PERTH, JANUARY 1995



Floreat 13-3-95

JAMBOREE

The highlight of my 92 years of living were the 10 days I spent with 1250 scouts. The children between 6 and 13 years of age were outstanding learners, The majority, 12,000 scouts were of English descent and very happy; scouts from non-English speaking countries looked very discontented. The lack of communication was disappointing.

During the 10 days of the Jamboree, I was demonstrating and teaching the world-language, Esperanto to scouts. They were impressed with the facility of learning Esperanto. When I mentioned that there were 3,000 languages in the world but fortunately one language, invented by a genius, Dr Zamenhof, a man with vision, foresight and intuition, which can be used by people of the whole world. Esperanto is easy to learn, without spelling problems and represents world culture.

The children were overjoyed and instinctively shouted," This is a magic language." They said that they wanted to learn it.

A petition to the Minister of Education was placed on the table during the 10 days and scouts signed their names with countries of origin. There are 1,252 names on the list.

Let us hope that my experience will inspire others

Idyss Einihovici

Idyss Einihovici
88 Newry Street
Floreat Park WA 6014

The Tim and Idyss Einihovici Fund was established in 1988 to help youth studying Esperanto to attend the International Esperanto Youth Congress each year.
Idyss Einihovici also established the Australian Children's Perpetual Fund for Esperanto Education and Travel in 1994 to further the teaching of Esperanto in primary schools. At present the Fund has a capital of about $20 000. It is hoped to use this Fund to help finance the trial year of teaching Esperanto in a West Australian primary school in 1996.
Readers' attention is also brought to the detailed article on the EKPAROLI study of the teaching of Esperanto in Victoria as an aid for learning Asian languages, in this issue of *Esperanto sub la Suda Kruco* pp. 6-8.

lin kaj liajn verkojn. Mi ĝojus, se legantoj disponus pri pliaj informoj ĉi-rilate.

De Donald Broadribb:

Mi dankas al la multaj legantoj kiuj bonvolis skribi aŭ e-poŝti al mi kun resaniĝ-kuraĝigo. Kvankam mi pli malsanis ol mi supozis dum la periodo januaro-aprilo, la diabeto estas nun regata per insulino, kaj mi vivas pli-malpli normale. (Mia dieto ne multe bezonis ŝanĝiĝi, ĉar mi neniam estis sukervorulo.) Dum kelka tempo miaj pinglotruplenaj fingroj nur dolorate tuŝis la klavojn de la komputilo—ĉar necesas plurfoje dum ĉiu tago kontroli la glukoznivelon en la sango—sed nun ili jam hardiĝis.

Intertempe, nia kara kolego kaj amiko Odlo Bokserp bonvolis komposti la martan kaj majan numerojn de *ESK* kaj fuŝis respondojn al alskribintoj, pro kio mi multe dankas al li. [?]

Al ĉiuj recenzistoj kiuj bonvolis kondamni kiel neglektendan fuŝverkon la esperantigitan formon de *Malbeno Kara*, mi sendas miajn plejelkoraĵojn. (Ĝis nun nur unu recenzisto brita tiel honoris min, sed versajne lin akompanos aliaj necerbokombemuloj.)

Aliflanke, al UA kaj Eugène de Zilah mi multe dankas pro iliaj korvarmigaj gratuloj pro la esperantovestiĝo de Platono per *La Respubliko*. ❑

Karl Dominik Gunster

Forpasis la 17an de majo, 1995, Karl Dominik Gunster, kiu aliĝis al la Brisbana Soceto en 1959. Li elektiĝis prezidanto de BES en 1961, kaj gvidis la societon ĝis 1971, kiam li elektiĝis honora dumviva membro de BES. En 1967 li vizitis Eŭropon, precipe Bonn en Germanio kie li naskiĝis la 13an de aŭgusto 1902. Tie loĝis lia sola parenco, frato. Li kaptis la oportunon partopreni en la U.K. en Madrid. Karl iĝis metilernanto kaj poste akvotubisto. En 1939 Karl laboris en Persio (nuntempa Irano), kaj ne povis reveni al Germanio pro la Dua Mondmilito. Li decidis iri al Aŭstralio. En Brisbano li tuj enkarceriĝis dum la sekvaj tri jaroj kiel "ano de malamika lando". Tamen tie li renkontis sian estontan edzinon Erika, en la apuda virinsekcio apartigita per alta pikdrata barilo! Post la milito li daŭrigis sian metion, kaj konstruis sian propran domon kie li loĝis ĝis la fino. En 1985 li suferis apopleksiatakon kiu severe limigis lian vivstilon. Fine, post pneŭmonio, li mortis pro severa koratako, en hospitalo. Karl partoprenis en Kongresoj de AEA: Manlio, 1968; Brisbano, 1974. Li ĉeestis la inaŭguron de la Esperanto-Federacio de Kvinslando en 1971 en Redcliffe.
Adiaŭ Karlo, nia kolego kaj multjara laboranto por Esperanto.

Ray Ross

LINGVA ANGULO

de Alan Towsey

De Kay Andersen (Moorooba, Kvinslando) venas interesa demando:

"Mi havas problemon pri la nomo de mia ŝtato, Queensland. Ĉiuj ĉi tie feliĉe nomas ĝin "Kvinslando", sed al mi, tiu tradukaĵo donas nur la prononcon sed ne la signifon de la vorto. Vere, Aŭstralianoj komprenas tiun tradukaĵon, sed mi scivolas pri eksterlandanoj; eble, ili pensas, ke ĝi estas la "lando de la Kvin"?

Mi mem preferas nomi ĝin "Reĝinlando" aŭ eĉ "Kronlando". Ĉu vi bonvole povus proponi taŭgan vorton?

Nu, en la praktiko, kiam oni mencias lokon, kiu troviĝas en alia lando, oni kutime uzas la tiulandan nomon (ofte erare prononcatan!) aŭ tradukas ĝin pli ofte laŭ la formo. Ekzemple, la itala "Roma" aŭ "Napoli" iĝas "Romo" kaj "Napolo" en Esperanto, "Rome" kaj "Naples" en la angla. La japana "Tookyoo" iĝas "Tokio" en Esperanton, "Tokyo" en la angla. Neniu provas traduki la *sencon* de ĉi lasta, nek en Esperanto nek en la anglan, nomante ĝin "Orientĉefurbo" aŭ "Eastern Capital"–kiu estas ĝia vera signifo.

Mi eĉ dubas, ĉu multaj personoj, eĉ denaskuloj, pensas pri la *signifo* de la bazaj elementoj de tiaj loknomoj en sia ĉiutaga uzado. Ekzemple, kiu Aŭstraliano pensas pri la baza signifo de "Queensland" uzante tiun vorton? (Same, preskaŭ neniu angleparolanto pensas pri la bazaj elementoj de "cupboard" (ŝranko): cup + board (= tasbreto)—la signifo jam plivastiĝis. Aŭ pri la signifo de la Sidneja antaŭurbo "Newtown" (= Novurbo)? Ĉu vi tradukus tian nomon laŭvorte? Fakte, "Novurbo" estas ankaŭ la vera signifo de la rusa urbo "Novgorod"; se oni tradukus ilin, oni povus konfuzi la du loknomojn!

Do, responde al via demando, Kay, la nomo "Kvinslando" estas jam ĉie akceptata kaj tiel firme enradikiĝis en Esperantio (efektive, tute konforme al la 15a regulo de la *Fundamenta Gramatiko de Esperanto*!), ke provoj ŝanĝi ĝin nun estus Kanutecaj kaj eĉ kontraŭfundamentaj.

De nia estimata redaktoro venas ankaŭ ero. Li sendis al mi karikaturon el *Eventoj* (Majo, 1995), kiu montras virinon forĉasantan viron el la redakcio de *Eventoj*, kun sube la vortoj: "Ne kuraĝu reveni, ĝis vi ne reabonis!"

Lau *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* kaj *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*, la uzo de *ĝis ... ne* estas evitinda. Laŭ tiuj konsultlibroj, la signifo de *ĝis ... ne* estas *tiel longe, kiel* aŭ *dum*. Ili citas el Kabe: "Mi ne kredos al viaj vortoj, ĝis vi ne donos pruvojn", kiu frazo egalas, laŭ ili, al "dum vi ne donos ..." aŭ "tiel longe, kiel vi ne donos ..." (so long as you don't prove it).

Tia uzo ŝajnas esti influata de rusa sintakso—en la rusa *ĝis* tradukiĝas per пока не *poka ... nje* (= *ĝis ... ne*).

Iom strange, en la *Universala Vortaro* de Zamenhof, la rusa traduko de *ĝis* estas nur до *do*, kiu estas prepozicio, kvankam ke *ĝis* estas kaj prepozicio kaj subjunkcio estas klare pruvita de la fakto, ke la tiea franca traduko estas *jusqu'à* (prepozicio) kaj *jusqu'à ce que* (subjunkcio). Kaj tio ne estis ŝanĝita en la *Korektoj* de 1914.

(Parenteze, do, ne uzu *ĝis kiam* por la simpla *ĝis*!)

La koncerna frazo do devus teksti: "Ne kuraĝu reveni, ĝis vi reabonos (aŭ, pli peze: ĝis vi estos reaboninta)."

PICTURESQUE EXPRESSIONS

Bernard Golden's article on proverbs in the May-June number of *ESK* coincided neatly with my notes on picturesque expressions in Esperanto.

Proverbs are the source of many picturesque expressions in all languages, and I agree with Bernard that either the original proverbs or the expressions that derive from them are far more common in everyday life than his critics appear to believe.

So "castles in the air" (kasteloj en la aero) is by no means uncommon, and I myself have often had to point out that "A person who never makes a mistake never makes anything" (Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras.[z])

And don't people still say "The early bird catches the worm" (Kiu frue leviĝas, facile riĉiĝas.[z])? "Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon" is a much more colourful rendering of "Mind your own business" or "It's no concern of yours" or "None of your business" than "Zorgu pri la propraj aferoj". And Bernard's "Mefito mokas putoron kaj mem eligas fetoron" is a magnificent translation of "People in glass houses shouldn't throw stones"! And his "Oni ne devas esti freneza por esti esperantisto, sed tio helpas" I found not only amusing but also very apt (ege trafa)!

Here is a Zamenhofan proverb I noticed recently: "Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota." What could be a better rendering of "A bird in the hand is worth two in the bush"?

Happening to use the expression "as fit as a fiddle" the other day, I fell to wondering how it originated, and how to render it as colourfully in Esperanto.

Well, as to its origins, the etymologists can only guess, some thinking that perhaps it is a corruption of "fit as a fiddler", since a fiddler has to be fit in order to be able to move the fingers rapidly, smoothly and precisely over the strings. Hm, maybe...

A search through dictionaries in nearly a dozen languages revealed that most translate the *idea*, with phrases corresponding roughly to "in perfect/excellent health/form"—so in Esperanto *sanega* would do, but somehow that seems to lack something. Spanish has "go/be like a clock", but both Dutch and Italian—quite different languages — have "fit as a fish/healthy as a fish"! So why not "sana kiel fiŝo"?! Any other ideas? ❑

Dialogoj de la Dioj

de Lukiano

Tr. José F. Martín del Pozo

(daŭrigo)

(Satira serio de dialogoj en kiuj la dioj klaĉas unuj pri aliaj, kaj ankaŭ kverelas. En la dialogoj Lukiano primokas la tradiciajn mitojn pri la dioj. Hera kaj Zeŭso ĵus kverelis pro seks- perforto kiun Zeŭso antaŭ nelonge faris al la bela knabo Ganimedo, kaj nun pri la deziro de Iksiono sekskuniĝi kun la edzino de Zeŭso, Hera. Zeŭso proponas fari modlaĵon similaspektan kiel Hera, kaj Ikisono kuniĝu kun tiu trompaĵo.)

Hera: Neniel! Li mortu, pro tio, ke li deziris, kio estas super li!

Zeŭso: Tamen atendu, Hera. Kion teruran vi povus suferi pro tiu modlaĵo, se Iksiono estos kun nubo?

Hera: Sed ŝajnos ke la nubo estas mi, kaj li hontigos min per la simileco.

Zeŭso: Ne diru tion; ĉar nubo neniam povus esti Hera, nek vi nubo. Nur Iksiono trompiĝos.

Hera: Sed ĉiuj homoj estas maldelikataj; eble li fanfaronos kiam li descendos kaj rakontos al ĉiuj, dirante ke li kuniĝis kun Hera kaj ke li kunlitas kun Zeŭso, kaj eble li eĉ diros ke mi enamiĝis en lin, kaj ili kredos lin, ĉar ili ne scios, ke li kuniĝis kun nubo.

Zeŭso: Neniel! Se li diros tiaĵon,

falinte al Hadeso, mizerulo, ligite al rado li ĉiam kunturniĝos kun ĝi kaj havos senĉesajn suferojn, ĉar mi punos lin ne pro la amo (ĉar tio ne estas serioza) sed pro la orgojlo.

(Dialogo 7: Hefesto kaj Apolono)

Hefesto: Apolono, ĉu vi vidis la ĵus naskitan infanon de Maja? Kiel bela li estas! Kiel li ridetas al ĉiuj kaj jam montras, ke li estos io granda!

Apolono: Tiu, infano? Ĉu ne grandaĝa, Hefesto? Tiu, kiu ruze estas pli maljuna ol Japeto?

Hera: Kaj kiel li povus maljusti, se li estas ĝusnaskito?

Apolono: Demandu al Pozidono, kies tridenton li ŝtelis, aŭ al Areso, kies glavon li ŝtele forprenis el la ingo, por ne paroli pri mi mem, kiun li senigis je arko kaj sagoj.

Hera: Ĉu li tion faris, tiu bebo kun vindotukoj, kiu nur ĵus marŝkapabliĝis?

Apolono: Vi scios, Hefesto, se nur li proksimiĝos al vi.

Hera: Nu, li jam proksimiĝis.

Apolono: Kaj kion? Ĉu vi havas ĉiujn viajn ilojn kaj neniu el ili perdiĝis?

Hera: Mi havas ĉiujn, Apolono.

Apolono: Tamen, rigardu bone.

Hera: Je Zeŭso, mi ne vidas la tenajlon!

Apolono: Sed vi vidos ĝin inter la vindotukoj de la bebo.

Hera: Ĉu li estas tiel manlerta, kvazaŭ li praktikis ŝteladon en la ventro de sia patrino?

Apolono: Vi ankoraŭ ne aŭskultis lin paroli lerte kaj sengêne. Li volas eĉ servi nin. Hieraŭ, vokinte Eroson, li tuj venkis lin, stumbligante lin ambaŭpiede, mi ne scias kiel. Tiam, dum Afrodita aplaŭdis kaj brakumis lin pro la venko, li ŝtelis ŝian zonon kaj la sceptron de Zeŭso, kiu ankoraŭ ridis. Se la fulmo ne estus tro peza kaj havus fajron, li forprenus ankaŭ tion.

Hera: Vi diras, ke la infano estas terura.

Apolono: Ne nur tio, sed ankaŭ muzikema.

Hera: Kiel vi povas atesti tion?

Apolono: Ie li trovis kelonion mortan kaj el ĝi li faris muzikilon. Li adaptis kaj jungis brakojn al ĝi, tiam alfiksis kejlojn kaj ĝustigis ponteton sub ĝi kaj streĉis sep kordojn, kaj ekkantis tre bele kaj harmonie, Hefesto, tiel ke eĉ mi enviis lin, mi kiu delonge kutimas ludi citron. Maja diras, ke li neniam tranoktas en la ĉielo, sed descendas ĝis Hadeso pro malkvieteco, sendube por ŝteli ion ankaŭ tie. Li havas flugilojn kaj faris kaduceon eksterordiarefikan, per kiu li kondukas

la animojn kaj gvidas la mortintojn.

Hera: Mi donis ĝin al li por ludi.

Apolono: Nu, li rekompencis vin. La tenajlon...

Hera: Dankon pro memorigi min; ĉar mi hastos reakiri ĝin, se, kiel vi diras, ĝi troveblas en la vindotukoj.

(Dialogo 8: Hefesto kaj Zeŭso.

(Laŭ mito, Zeŭso naskis Atenan el sia kapo)

Hefesto: Kion mi faru, Zeŭso? ĉar mi venis, kiel vi ordonis, kun hakilo tiel akra, ke ĝi dishakus eĉ ŝtonon unubate.

Zeŭso: Tre bone, Hefesto; nu, faligu ĝin sur mian kapon kaj dishaku ĝin en du.

Hera: Ĉu vi provas scii, ĉu mi freneziĝis? Ordonu, kion alian vi volas.

Zeŭso: Ĝuste tion, ke vi dishaku mian kranion; se vi malobeos, vi scios pri mia kolero, ne unuafoje. Vi devas frapi per ĉiuj viaj fortoj, senprokraste, ĉar mi mortas pro akuŝdoloroj kiuj frenezigas mian cerbon.

Hera: Vidu, Zeŭso, ni ne misfaru; ĉar la hako tre akras kaj akuŝhelpos vin nek sensange nek kiel Ilitia.

Zeŭso: Faligu la hakon kaj fidu, Hefesto; ĉar mi scias, kio konvenas.

Hera: Malvolonte mi faligos ĝin. Sed kion mi faros, se vi ordonas... Kio estas ĉi-tio? Ĉu fraŭlino armita? Vi havis grandan malbonon en la kapo, Zeŭso; kompreneblas, kial vi malbonhumoris, naskante tian fraŭlinon ekde sub la meningo, kaj eĉ armitan; senscie vi havis tendaron anstataŭ kapo. Ŝi saltas kaj dancas piriĝe kaj skuas la ŝildon kaj svingas la lancon kaj entuziasmiĝas; kaj plej mirige, ŝi iĝis tre bela kaj matura en malmulte da tempo; ĉar ŝiaj okuloj verdas, sed la helmo kompensas eĉ tion, tiel ke, kiel akuŝrekompencon, donu kaj edzinigu ŝin al mi, Zeŭso.

Zeŭso: Vi petas neeblaĵon, Hefesto; ĉar ŝi volas ĉiam resti virga. Kaj mi ne kontraŭdiros tion.

Hera: Mi volis tion; la cetero dependos de mi kaj mi forrabos ĝin.

Zeŭso: Se tio facilas al vi, faru tiel; sed mi scias, ke vi volas neeblaĵon.

(Dialogo 9: Pozidono kaj Hermeso)

Pozidono: Hermeso, ĉu eblas paroli kun Zeŭso?

Hermeso: Neniel, Pozidono.

Prometeo: Tamen, anoncu min al li.

Hera: Mi diras, ke vi ne ĝenu

lin; estas neoportune; do vi ne povos vidi lin nune.

Prometeo: Ĉu li estas kun Hera?

Hera: Ne, temas pri io alia.

Prometeo: Mi komprenas; Ganimedo estas kun li.

Hera: Ankaŭ ne; li malsanetas.

Prometeo: Kiel, Hermeso? ĉar vi diras strangaĵon.

Hera: Okazas, ke mi hontas diri.

Prometeo: Sed vi ne hontu, mi estas via onklo.

Hera: Li ĵus naskis, Pozidono.

Prometeo: Neniel! Ĉu li naskis? Kiel? Ĉu eble li estis hermafrodito kaj neniu el ni sciis? Ankaŭ lia ventro ne montris ŝvelon.

Hera: Vi pravas; ĉar ĝi ne enhavis la feton.

Prometeo: Mi komprenas; li denove naskis el la kapo, kiel li naskis Atenan. Li havas kapon fekundan.

Hera: Ne, li portis la bebon de Semela en sia femuro.

Prometeo: Bone, jen la admirindulo, kiu gravediĝas tuta kaj per tuta sia korpo! Sed kiu estas Semela?

Hera: Tebanino, unu el la Kadmidinoj. Li kuniĝis kun ŝi kaj gravedigis ŝin.

Prometeo: Do, li akuŝis anstataŭ ŝi, ĉu, Hermeso?

Hera: Certe, eĉ se tio ŝajnas al vi mirinda. Hera, trompinte Semelan (ĉar vi scias, ke ŝi tre ĵaluzas), persvadis ŝin peti Zeŭson veni al ŝi meze de fulmoj kaj tondroj; kaj kiam li persvadiĝis kaj venis kun sia fulmo, bruliĝis la plafono, kaj Semela pereis meze de la flamoj. Li ordonis al mi, ke mi tranĉu laŭlonge ŝian ventron kaj savu la feton sepmonatan, ankoraŭ ne perfektan. Post kiam mi faris tion, li sekciis sian femuron kaj enmetis la feton, por ke ĝi finformiĝu tie. Kaj nun, post du monatoj, li naskis ĝin kaj malsanetas pro akuŝdoloroj.

Prometeo: Kaj kie estas nun la bebo?

Hera: Kondukinte lin al Nisa, mi transdonis lin al la Nimfoj, por ke ili nutru lin sub la nomo Dionizo.

Prometeo: Nu, mia frato estas samtempe patro kaj patrino de ĉi tiu Dionizo, ĉu ne?

Hera: Sendube. Mi foriras, portante al li akvon por la vundo kaj faronte la ceterajn aferojn kiuj kutimas por ĵusnaskintinoj.

(Dialogo 10: Hermeso kaj Helio. Helio estis la Sundio.)

Hermeso: Helio, Zeŭso diras, ke vi ne leviĝu hodiaŭ, nek morgaŭ, nek postmorgaŭ, sed restu hejme, kaj dume estu unu longa nokto; ke la Horoj malligu la ĉevalojn, vi estingu la fajron kaj ripozu longe.

Helio: Vi heroldas raran kaj neaŭditan aferon, Her-

meso. Ĉu li kredas, ke mi perdiĝis laŭ mia vojo kaj trapasis miajn limojn, kaj tial malkontentiĝis kaj decidis igi la nokton trioble pli longa ol la tago?

Hermeso: Nenio tia; tio ne daŭros por ĉiam; sed por nun li bezonas, ke la nokto estu iom pli longa.

Helio: Kie li estas? El kie li sendis vin por heroldi tion al mi?

Hermeso: El Beotio, Helio, el la hejmo de Amfitriono, kun kies edzino li amore kuniĝis.

Helio: Ĉu unu nokto ne sufiĉas?

Hermeso: Ne; ĉar el tiu kuniĝo naskiĝas dio granda kaj multbatala. Ne eblas plenumi tion en unu nokto.

Helio: Ke li faru tion bonsorte. Dum ni solas, Hermeso... ĉi tio ne okazis sub la regado de Krono. [*Patro de Zeŭso, kaj reganto antaŭ Zeŭso.*] Li neniam forlasis la liton de Rea, nek forlasinte la ĉielon amoris en Teboj, sed la tago estis tago, kaj la nokto daŭris laŭ sia mezuro, proporcie al la sezonoj; nenio stranga aŭ nenormala okazis, kaj li neniam kuniĝintus kun virino. Nun, pro malfeliĉa virino ĉio devas ŝanĝiĝi; miaj ĉevaloj devas maltrejniĝi pro la ripozo, la vojo iĝi malfacile irebla, ĉar mi ne transiros ĝin dum tri tagoj, kaj la homoj vivi malfeliĉe en mallumeco. Ili profitos tiele pro la amoroj de Zeŭso: ili sidos atendante, meze de profundaj ombroj, ĝis li finos tiun atleton pri kiu vi parolas.

Hermeso: Silentu, Helio, ke nenio malbona okazu pro viaj paroloj. Mi nun renkontos Selenan [*La lundiino*] kaj Hipnon [*La Dormdio*] kaj heroldos ankaŭ al ili, kion Zeŭso ordonas: ke ŝi malrapide avancu kaj Hipno ne forlasu la homojn, por ke ili ne rimarku, ke la nokto estas tiel longa.

(Dialogo 11: Afrodita kaj Selena
Selena estis la Lundiino)

Afrodita: Selena, kion vi faris, laŭ onidiroj? Kiam vi alvenas al Kario, ĉu vi vere haltigas la ĉaron por rigardi Endimionon dum li dormas aerlibere, kiel ĉasisto, kaj ĉu vi foje eĉ descendas apud lin, meze de via vojo?

Selena: Demandu vian filon, Afrodita, kiu kulpas pri tio.

Apolono: Ho, li estas insolenta; kion li faris eĉ al mi, lia patrino! *[daŭrigota]*

ĈU VI KONAS LA FAMILION OZEROV?

Mi serĉas kontakton kun la Esperantista familio Marina kaj Aleksandro Ozerov, kiu laŭ miaj informoj loĝas nun en Aŭstralio. Ĉu iu samideano scias ilian kieon? Kun ĉiaj anticipaj dankoj:

Stanislav Koncebovski
NKJO, ul. Moniuszki 4, Cieszyn
PL-43400 Pollando
Tel. +48-33-525372; Faksoj: +48-33-525322

RADIO 3ZZZ 1989-1995

raportas Svetislav Kanaĉki

Post preskaŭ 6 jaroj ni fine venis al nia unua Ĝenerala Kunveno. Por vidi kion ni faris dum tiu tempo, mi prezentas al vi detalojn:

De 16 Junio 1989 ĝis 1 Majo 1995:
317 programoj po 15 minutoj = 166.25 horoj
Lecionoj: *Bonan Tagon* 39 programoj
Jen Nia Mondo 105 programoj
Kantoj: 1 233
Programoj per satelito komenciĝis la 11an de septembro 1994. Ĝis nun 35 programoj.
Elspezita: $10 785.94 por ses jaroj
Partoprenis en 3ZZZ persone, kasede, aŭ artikole: 33 personoj
Intervjuitaj eksterlande: 26 personoj
Kaj programoj el Pollando, Svislando, Aŭstrio, Vatikano, Ĉinio, Kubo, Svedio, Francio.
Kasedoj de 3ZZZ — Esperanto-programoj: 142
Kasedoj de intervjuoj, paroladoj, lecionoj, skeĉoj, ks.:102
Kasedoj de kantoj, poemoj, paroladoj: 60
Bobenoj kun lecionoj kaj malplenaj: 15
Ekde 9 januaro 1995 la Esperanto-programo estas unuhora ĉiusemajne.

Detaloj havebas de:
3ZZZ Radio 92.3 FM
Esperanto-Programo
PO Box 1106
Collingwood Vic 3066
Aŭstralio.

POR ĜUSTE UZI ESPERANTON

de Marcel Leereveld

66xA4 paĝoj
$25 (inkl. sendkostojn)

Kolekto de artikoloj aperintaj en *The Australian Esperantist* / *Esperanto sub la Suda Kruco* plus multaj novaj artikoloj. Por la progresintoj: enestas aro da valoraj diskutoj, inkl. de "Komparo de komplementoj en kelkaj malfacilaj kazoj", "La infinitivo", "Malvastigo de vortsignifoj", "Ante kaj ate", "Da", "La adverbo en Esperantoj", "Komparoj," kaj multaj aliaj.

Mendu de Donald Broadribb, 59B Lukin Street, Beverley WA 6304.

RONDO KATO

ESPERANTISTA KAT-AMIKARO



La grupo konsistas el ĉ. 100 Esperantoparolantaj katŝatantoj en 23 landoj. Provnumero de la bulteno *Kat-folioj* kaj membrolisto estas akireblaj kontraŭ du IRK. Adreso: S-ino Ingrid Näsholm, Linderbergsg. 4, S-853 56 Sundsvlall, Svedio

Libroservo de AEA: Novaj Libroj

291: ABC-Gramatiko de Esperanto FLAN "240b **$49.90**
De Vleminck,C /Van Damme,

554: Apenaŭ Papilioj en Bergen-Belsen PESP N148b **$30.00**
Steele, Trevor 1994 Originala romano pri Germanio

23: Asteriks Gladiatoro KEU BI48b **$19.00**
Goscinny I/Uderzo Kolora bildstriaro pri kuraĝaj gaŭlaj gladiatoroj

392: Aventuroj en Esperantujo AEAL N92b **$8.00**
Harry, Ralph 1994 Mondsperto de eminenta aŭstralia esperantisto

465: Ĉu Vi Aŭdis Ke...? SMID @"64b **$35.00**
Smideliusz, Katln Kasedo/libro por mezgrada lingvonivelo —Komprenekzerco

578: Enlumiĝo KARD P44b **$7.80**

693: El Sisma Zono FLAN P109b **$ 17.00**
Giŝpling, Mikael 1994 Rusa poeto de "pura liriko kun versa rigardo"

571: Esperantaj Moneroj Moneroj 1, 5, 10, 25 steloj **$ 64.00**

718: *Kolera Afero* FLAN N88b **$ 10.00**
Gates, Ronald C 2a volumo el la serio de *Septaga Murdenigmo* 1994 Detektiv-rakonto

329: Malbeno Kara BROA N120b **$27.50**
Webb, Mary /Kirkwood, Grace/red. Donald Broadribb 1994 Traduko de *Precious Bane*

327: Merlo Sur Menhiro KARD BP94b **$ 7.80**
Goodhier, Albert Lirikaj, moralaj, kaj humuraj poemoj

423: Mil Unuaj Vortoj en Esperanto BEA I60B **$29.40**
Amery, Heather I/Cartwright, Steve Kolore ilustrita bildvortaro por infanoj

464: Morto de Sciencisto FLAN N81b **11.50**
Gates, Ronald C Tria volumo el la serio de *Septaga Murdenigmo, Kolera Afero* 1995

538: Nordmara Duopo KARD P29b **$5.60**

408: Plena Poemaro FLAN P176b **$1.60**
Miĥalski, Euĝ, Red. Auld, William 1994 "la versharmonio min ravas" Krys Ungar

113: Pratempo. La kaj Brolgo AEAL N 52b **$ 5.00**
Mountford, C /Ralph Harry folkloro aŭstraliaborigena

270: Refoje Krimnoveloj Sep AEAL N90b **$8.00**
Gates, Ronald C 1994 Dua en serio de aŭstraliaj krimnoveloj

801: Respubliko, La AEAL N113b **$20.00**
Platono. /Tr. *Broadribb, Donald* Rekta traduko el la Greka

288: *Sferoj-9 NIFO N136b **$15.40**
R/Arudiz, Miguel G Trancita Komuniko, Alabastra Ĝardeno, Heredaĵo, Unua Leĝo

433: *Sferoj-8 NIFO N144b **$15.40**
R/Arudiz, Miguel G Video Homo, Apogpunkto, Afiŝo, →

Interplaneda konferenco Esplor.

*"Nifo" = scincfikcia rakontaro.
Substrekitata nomo de aŭtoro/tradukinto indikas aŭstralian verkiston.
Substrekita prezo indikas specialan prezon validan nur en Aŭstralio kaj Nov-Zelando.



Uzantoj de WINDOWS

Nun haveblas SENPAGE nova Esperanta programo
Nomo de la programo: *Supersigno*
Supersigno aldonas Esperantajn literojn al la sistemo-litertipoj kaj ŝaltas la Windows-sistemon al la novaj litertipoj.
Supersigno prezentas Esperantajn literojn per klavpreso de ` aŭ ~ aŭ ^ plus la dezirata litero.
Windows aŭtomate startigas *Supersignon.*
Ĉiu Windows-programo uzeblas kun *Suprsigno.*
Supersigno disponigas por uzantoj de *Winword* 28 000 vortaron por literumada korektado.
Preparis la programon *Supersigno* Mark kaj Jeff Hayward, en Aŭstralio.
Prezo en Aŭstralio: $3 por pagi la koston de la disketo sur kiu estas la programo.
Vi rajtas senpage kopii la disketon kaj distribui ĝin inter aliaj uzantoj de la Windows-sistemo.
Mendu de la Libroservo de AEA.



Macintosh-Uzantoj


Esperantaj alfabetoj por uzado kun ĉiu por-Macintosha programo haveblas senpage de
Donald Broadribb
59B Lukin Street
Beverley WA 6304
Pli ol 30 literstiloj haveblas, por ĉiu bezono.
Por 4 plej utilaj alfabetoj, sendu simplan DD diskon
Por la tuta alfabetaro, sendu du HD-diskojn
Bonvolu kunsendi ankaŭ taŭgan afrankitan memadresitan koverton (ni rekomendas uzi la "Computer Disk & Photo Mailer" vendatan de Australia Post).
Ĉi tiuj alfabetoj estis disponigitaj de *Eventoj* por senpaga distribuado, kaj preparitaj de Peter Broadribb por Aŭstraliaj klavaroj. (Oni uzas la *control*-klavon plus la deziratan literon por fari Esperantan literon.)
Necesas ke via Macintosh-komputilo uzu Sistemon 7 kaj havu minimume 4 megabajtojn da RAM.




desegnis Igorj Sitnikov

Krucvorto

Ĉiu numero egalas al unu esperanta litero. Kompilis *Ilkka Santtila*.





23	11	2	1	6	4	3	7		2	22	7	18	9	7	27	7
11		27		27		4		23		1		4		13		22
25	4	11	13	1	28	7	3	17		6	7	10	11	7	27	1
20		13		7		19		26		4		4		5		2
17	6	7	27	3	1		13	7	26	16	3	17	22	17	27	1
20		3		1		8		6		4		27		11		26
1	20	17	4		18	4	5	18	1		7	25	17	23	6	7
19		26		20		22		7		8		7				19
	2	17	6	11	26	5	7		8	7	13	21	7	27	1	
13				26		1		5		26		1		1		13
7	15	3	17	3	1		21	17	26	12	1		7	10	4	1
27		7		14		23		10		1		24		20		26
20	4	27	5	7	27	7	26	17	1		6	7	9	17	22	1
1		4		6		24		27		17		11		27		21
27	7	2	7	17	22	7		3	4	3	1	22	21	7	16	1
5		7		3		12		1		26		22		14		22
7	26	23	3	7	3	7	15		6	7	23	17	27	1	22	1

1 O	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	
14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27

Represita laŭ afabla permeso de la aŭtoro kaj de Esperantolehti

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

estas komuna eldonaĵo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

La Aŭstralia Esperanto-Asocio:
P.O. Box 313, Sunnybank Qld 4109
Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.
Vic-Prezidantoj:
Vera Payne, 36 Donegal Road, Floreat Park WA 6014.
Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney SA 5069.
Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank Qld 4109.
Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.
Membrokotizoj: AŬ$30 por individuo, klubo, kc, (+$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); $20 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto. Ĉiujn nomo- aŭ adreso-ŝanĝojn kaj korektojn nepre sendu al la redaktoro.

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:
PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.
Prezidanto: David Rockell, 5-71 Princes St, Otahuhu, Auckland 1006. ☎ 09-270 3669,
Sekretario: Brad McDonald, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ kaj fakso: 09-579 4767.
Kasisto: Jackie Fox, PO Box 8170, St Lukes, Auckland 1003.
Membrokotizoj: NZ$40 por individuo; $50 por geedza paro; $10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Kluboj po $1 por ĉiu ano.

Ekster Aŭstralazio abono al *Esperanto sub la Suda Kruco* kostas 55 ned. gld., kio inkludas aerpoŝtan sendadon. Oni povas mendi la gazeton:
Per pago de 55gld en la konton ĉe UEA de la Libroservo de AEA, konto aeal-w, kun samtempa informo al la Libroservo de AEA, aŭ
Per mendo rekte al la Libroservo de AEA, pagante per 37 IRK (aĉetitaj post februaro 1992), aŭ per bankĉeko en Aŭstraliaj dolaroj AŬ$44. Sendu al la Libroservo de AEA, aŭ
En Usono kaj Kanado abono kostas US$28 kaj mendeblas ĉe ELNA.

Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 1995 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 1995 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estis perkomputile kompostita de Donald Broadribb, per Macintosh LC III kun Sistemo 7.5, uzante Nisus®Writer kaj Apple OneScanner kun Ofoto 2.0. Artikoloj kopiiĝis per OmniPage Professional. Alfabetoj uzitaj estas IF New Century Schoolbook 10pkt (Altsys Corp.), kaj Orion Esperanto 16pkt (disponigita de *Eventoj*).

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304. Printed by Snap Printing, 921 Albany Highway, Victoria Park East WA 6101.